

BRAZILA ESPERANTISTO

65-a Jaro

JULIO-SEPTEMBRO 1971

N.º 688-690

Oficiala organo de **Brazila Esperanto-Ligo**, Societo de publika utileco (dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921). Jarabono eksterlande: 15 respondkuponoj.

Sidejo: **Praça da República, 54, 2.º** — Telefono: 232-6309 — RIO DE JANEIRO — BRAZIL
Respondeca redaktoro (redactor principal): **D-ro Carlos Domingues**



ARACAJU SERGIPE

Konstruaĵo Estado de Sergipe kun 28 etaĝoj.

En la komenco de la Brazilo Movado estis en Aracaju, ĉefurbo de Sergipe, vigla laboro sub la gvido de nia karmemora Alcebiades Pais. Nuntempe Associação Esperantista de Sergipe denove disvastigas Esperanton en la Stato

KONVERSACIO (V)

ĈE DOKTORO

— La konsultejo de D-ro Paŭlo?
— Jes. Ĉu li antaŭdifinis horon al vi?

— Bonvolu fari al vi oportune sur la seĝo. Flegistino, la slipon de nia kliento.

— De iom da tempo, Doktoro, la spiro mankas al mi ĉe pli rapida parolado...

— Demetu la jakon kaj ĉemizon. Mi devas fari kompletan esploron.

— Kuŝante, mi ofte sentas palpitacion. Simptomo de difekta angocirkulado; ĉu ne?

— La brustaŭskulto malkovras nenion misordan pri via koro.

— Ĉu vere?! Estas fidinda via stetoskopo?

— Por via trankviliĝo, vi petu elektrokardiogramon al D-ro Bruno. Faru nur tion; kiel kutime li sendos la rezultaton rekte al mi.

— Sed, Doktoro, de kelkaj tagoj mi havas klaran impreson, ke la piedoj iomete ŝvelas...

— Malgrava nervoza perturbo. Ripozu kion eble plej multe kaj evitu ĉian ekscitiĝon.

— Kaj vi preskribos neniun medikamenton?!

— Via sano estas bona, kara amiko. Faru injekton de ĉi tiuj ampoloj laŭ la instrukcioj; se vi sentos ion novan, revenu al mi.

— Ĉu mi observu ian dieton

— Bone. Konvenas abstini de fumado, fortaj trinkaĵoj, salo kaj spicaĵoj.

— Fraŭlino, kiel pagi la honorarion al Doktoro?

— Vi ricevos noton pri tio.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Assembleia Geral Ordinária

Em 24 de Abril de 1971 às 17 hs. na sede social, reuniu-se em sessão ordinária, a Assembleia Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na

QUOTA ANUAL DE ADESAO À LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Membro simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brasileira Esperantista" 15,00

Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista 40,00

Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto" 60,00

Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante 90,00

Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 10 vezes a quota deste.

Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante e paga 20 vezes a quota deste.

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque pagável no Rio de Janeiro à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 2.º
Rio de Janeiro, GB

forma dos Estatutos. A Sessão foi presidida pelo Dr. Carlos Domingues, Presidente da Liga, e secretariada pelos 1.º e 2.º Secretários, Engenheiro Floriano Pessoa e Dr. Joel Vasques Manso. Compareceu regulamentar número de sócios, inclusive representantes de instituições filiadas. O 2.º Secretário leu a Ata da Sessão anterior, que foi aprovada sem discussão. Em seguida foi feita pelo 1.º Secretário a leitura do Relatório do Presidente, referente às atividades da Liga no ano de 1970, e, pelo 2.º Secretário, a leitura do Balanço da Tesoureira de 1970, sendo ambos os documentos aprovados por unanimidade. Por proposta do Cel. Jorge Campos de Oliveira a Assembléia aprovou voto de pesar pelo falecimento de Germano Meinhardt, de Porto Alegre, Milton Paulino dos Santos, do Rio de Janeiro, Jorge de Saldanha Carreira, de Portugal, Antonio A'eixo Martins, de Belo Horizonte, Miguel de Arruda Câmara, de Recife, e Carolina Maia Leitão, do Rio de Janeiro.

AKADEMIO DE ESPERANTO

OFICIALA KOMUNIKO

La Akademio, post zorga esploro de la demando, oficialigis jenan regulon pri la uzo de la refleksiva pronomo-adjektivo. Ĝi esperas per tio pozitive kontribui al pli granda unueco de la uzado.

REGULO

I. La refleksivaj pronomoj (serio *si/sia*) rilatas nur la 3-an personon kaj resendas al la plej proksima subjekto, aŭ singulara aŭ plurala. Tiu subjekto ne ĉiam koincidas kun la gramatika subjekto de la tuta frazo, ĉar novan subjekton povas enkonduki (1) infinitivo, (2) a-finaĵa participo kaj (3) substantivo de verba deveno, kiam ĝi klare esprimas agon.

II. Foje la vera subjekto lasas sin vidi per enmeto de la vortoj *kiu(j) est-*, ekz. apozicioj adjektivaj aŭ substantivaj provizitaj per komplemento (ekz. *kastelo fama pro sia historio*; sed *li ekvidis sian fraton Benjaminon, la filon de lia patrino* = B., kiu estis la filo de...).

III. Ekzistas tradicie sankciitaj vortkunmetoj kaj frazeroj, en kiuj la refleksivo funkcias absolute, sen rilato al la agsubjekto: ekz. *sia-tempe*, ktp.

IV. Nekonformiĝo en iaj okazoj, se el tio rezultas pli granda klareco, estas tolerata.

GVIDAJ EKZEMPLOJ

I

Vi lavas vin kaj li lavas sin.
Ĉiuj homoj akiras por si.

Ŝi estas amata por si, ne por la doto.
Ŝia propra patrino forpelis ŝin de si.
Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin mem.

Mia patrino plendas, ke ŝiaj filinoj faras ĉion por si, nenion por ŝi.

Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝt lavis sin en sia ĉambro.

La infanoj serĉis sian patrinon.

Ŝi estas amata de siaj instruistinoj.

Li promenis kun sia edzino; li kaj lia edzino promenis.

Ili kondukis la kolegojn en sian loĝejon anstataŭ iri kun ili en ilian.

La patrino diras, ke ŝia filino venos kun sia infano.

(1) infinitivo

La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin por la ceremonio.

La sinjoro ordonis al la servisto vesti sin pli dece.

La mizero kutimigis lin levi sin el la lito tre frue.

Jozefo ordonis al siaj servistoj balzami lian patron.

Li invitis la pentriston alporti unu el siaj pentraĵoj.

La reĝo, konsultinte kun la ĉefministro, sendis voki sian kuraciston.

(2) a-finĵa participo

Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi.

Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si.

Li sidigis sur la seĝo prezentita al li.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem.

Li estos kiel arbo donanta sian frukton en sia tempo.

Li rekompencis la soldatojn batalintajn por lia savo.

BRAZILA KRONIKO

RIO DE JANEIRO

Niterói — “O Espírito Fluminense”, organo de Spiritisma Federacio de Stato Rio de Janeiro, aperigis en sia numero de Junio lasta trafan artikolon sub la titolo Comunicação e Esperanto” (Komunikado kaj Esperanto) subskribitan de J. C. (nia agema samideano D-ro Joaquim do Couto, prezidanto de Niterói Esperanto-Klubo).

La pastro sentis la pekulon tuŝita de liaj admonoj.

La juĝisto opiniis la atestanton influata de siaj antaŭjuĝoj.

(3) *substantivo de verba deveno*

Marta admiris lian fidon al ŝi (Marta).

Marta admiris lian fidon al si.

Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj.

Ŝi kompleze aŭdis la flatadon de ŝiaj amindumantoj.

Ŝi ribelis kontraŭ la interveno de edzo en ŝiajn aferojn.

II

Li evitu la trinkaĵojn por li tro acidajn.

Ĉiu konas homojn nur por si indulgajn.

Picasso vizitis muzeon, faman pro liaj pentraĵoj.

Ili vizitis la muzeon, faman pro siaj pentraĵoj.

III

Moki ies fidon al si mem.

Oni komprenis liajn gestojn per si mem.

Ni ne povas koni la realon en si mem.

Metu ĉion en sian lokon.

En ĉiu kranio estas sia opinio.

SÃO PAULO

São Paulo — “Flash Serete”, interna organo de la firmo Serete S.A. — Engenharia, aperigis en sia numero de Junio lasta bonan artikolon sub la titolo “Ĉu Vi Scias Kio Estas Esperanto?” kaj subskribitan de nia agema samideano Ingeniero Jair R. Peixoto Laguna. La artikolo vaste efikis kaj ĝia aŭtoro sekve de tio devis disdoni sufiĉe grandan informan materialon pri Esperanto. Gratulon al S-ro Laguna!

RIO GRANDE DO SUL

Porto Alegre — Esperantista Societo de Porto Alegre eldonis kaj disdonas interesan flugfolion sub la titolo “Idioma Nacional ou Lingua Neutra?” (Ĉu Nacia Idiomato aŭ Neŭtrala Lingvo?). La folio, verkita de nia eminenta samideano D-ro Ernani Dias Corrêa, prez. de E.S.P.A., vige diskutas la temon kun trafaj argumentoj.

GOIÁS

Goiânia — Goiânia Esperanto-Klubo kaj Academia Goiana de Esperanto kunvenintaj en Ĝenerala Eksterordinara Kunsido la 18-an de Aprilo de la kuranta jaro, decidis kunfandi la du asociojn unu solan sub la nomo Instituto Goiano de Esperanto. I.G.E., elektis sian estraron, kies prezidanto estas Prof. D-ro Raul Conde.

Anápolis — Fundação Educacional e Cultural de Anápolis (Eduka kaj Kultura Fondaĵo de Anápolis), kiu estas sekcio de la loka urbestrejo, ekinteresigis pri Esperanto kaj malfermis kurson, kiun gvidas Prof. Cipriano José, malnova esperantisto. La Fondaĵo aĉetis ĉe B.E.L. grandan kvanton da Curso de Esperanto em 20 Lições por la kurso. Direktoro de la Kultura Sekcio estas Prof. José Teixeira.

FEDERACIA DISTRIKTO

Brasília — Laŭ cirkulero de la 27-a de Aprilo lasta estis elektita kaj tuj enoficiĝis la estraro de Esperanto-Asocio de Brasília por 3 jaroj. Prezidanto estas S-ro Nelson Pereira de Souza.

Aperfeiçoe o seu Conhecimento

...“Comecei, então, a evitar traduções literais, pensando diretamente na língua neutra. Daí por diante, senti que, em minhas mãos, ela deixava de ser mera sombra, sem base, dêste ou daquele idioma, com que eu lidava no momento; agora possuía espírito próprio, vida própria, fisionomia bem definida e claramente expressa, livre de quaisquer influências”.

Zamenhof

Traduza o trecho abaixo e aguarde o próximo número da revista para confrontar seu trabalho com nossa tradução colha ensinamentos, estudando os pontos de divergência.

O QUINZE

Raquel de Queiroz

Chegou a desolação da primeira fome. Vinha seca e trágica, surgindo no fundo sujo dos sacos vazios, na descar-nada nudez das latas raspadas.

— Mãezinha, cadê a janta?

— Cala a boca, menino! Já vem!

— Vem lá o quê!...

Angustiado, Chico Bento apalpava os bolsos... nem um triste vintém azeitado...

Lembrou-se da rede nova, grande e de listas que comprara em Quixadá por conta do vale de Vicente.

— Vou ali naquela bodega, ver se dou um jeito.

Voltou mais tarde, sem a rede, trazendo uma rapadura e um litro de farinha:

— Tá aqui. O homem disse que a rede estava velha, só deu isso, e ainda por cima se fazendo de compadecido...

Faminta, a meninada avançou; e até Mocinha, sempre mais ou menos calada e indiferente, estendeu a mão com avidez.

Contudo, que representava aquilo para tanta gente?

Horas depois, os meninos gemiam:

— Mãe, tou com fome de novo...

— Vai dormir, dianho! Parece que tá espritado! Soca um quarto de rapadura no bucho e ainda fala em fome! Vai dormir!

Konkurso de Traduko

Brazila Esperanto-Ligo denove malfermas al la brazilaĵ esperantistoj konkurson, kiu konsistos el traduko Esperanten de literatura peco.

La tradukaĵoj estos ricevitaj ĝis la 30-a de Aprilo de la venonta jaro. Ili ne devos havi la subskribon de la aŭtoro, sed pseŭdonimon, kiu estos ripetita sur koverto fermita, enhavanta la nomon kaj adreson de la aŭtoro.

La plej bona traduko estos publikigita en Brazila Esperantisto kaj ricevos Esperantan literaturan verkon kiel premion. La ĵugantaro konsistos el tri membroj de B E L.

La tradukotaĵo, kiu samtempe omagas Rui Barbosa kaj la urbon, kie formiĝis la unua Esperanto-Grupo en Brazilo, estas jena:

AS ANDORINHAS DE CAMPINAS

Rui Barbosa

Pelo límpido azul já sem sol, antes que se lhe esvaia de todo o ouro de seus átomos de luz, mas quando o crepúsculo entra a desmaiar do seu brilho a safira celeste, um ponto retinto, perdido nos longes mais remotos, se acentua em negro na cúpula do firmamento, lá bem alto, bem de cima, como se a ponta de uma seta, desfechada perpendicularmente de além, varrasse ali a redondeza anilada. Era um e, logo após, já são muitos, já vêm surdindo inumeráveis, já parecem infinitos; já se cruzam e recruzam, já se encontram e circulam, já se condensam e escurecem.

Era um grupo e já formam um bando, já vêm crescendo em longas revoas

E Cordulina deu o exemplo, deitando-se com o Duquinha na tipóia muito velha e remendada.

A redinha estalou, gemendo.

Cordulina se ajeitou, e ficou quieta, as pernas de fora, dando ao menino o peito rechupado.

Chico Bento estirou-se no chão. Logo, porém, uma pedra aguda lhe machucou as costelas.

Ele ergueu-se, límpido uma cama na terra, deitou-se de novo.

— Ah! minha rede! O chão duro dos diabos! E que fome!

SALDANHA CARREIRA

En pasinta numero ni publikigis nekrologon de nia karmemora samideano kaj amiko Jorge de Saldanha Carreira, el Lisbono.

Sendube interesos al niaj legantoj legi la lastan leteron, kiun ni ricevis de li:

Lisboa, la 25-an de Marto 1967

S-ro D-ro Carlos Domingues

Prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo

Tre kara amiko,

Ricevita via letero de la lasta 20.^a, kiu, laŭ vi certe pensas, treege plaĉis al mi, ĉar mi ĝin konsideris perdita.

Profitante mian emeritigon en la Portugalia Banko kaj mian eksigon el la portugala esperantista movado, mi plene min donis al la kolekto de miaj verkaĵoj kaj memoraroj por helpi la estontajn historiistojn de la esperantista movado; kaj pro tio ke mi timas eventualan fiagadon de niaj altaj instancoj, mi decidis sendi la portugallingvajn elementojn, (2 vol.), "Coisas esperantas" al miaj brazilaj amikoj kaj la esperantlingvajn al la "Internacia Esperanto-Muzeo de Vieno", ankaŭ 2 volumojn kun kvar partoj kaj pli ol

1.000 paĝoj. La kvara parto rakontas mian kampanjon por la liberigo de Esperanto en Portugalio, al kiu mi en mia lando kune kun altrangaj amikoj, geamikoj, de la eksterlando sukcesigis la venkon oficialan en la 12.^a de Aprilo 1951. Neniam mi forgesos vian brazilan helpon kaj vian specialan rolon en la batalo. Tio estas menciita en mia "Li kaj mi", en ĝia kvara parto. Nun mia laboro, nia laboro, vivas sendanĝere gardataj en la bibliotekoj de Brazila Ligo kaj de l' Internacia Muzeo; "Coisas esperantas" en la unua kaj "Li kaj mi" en Austrio, en la monumenta verkaĵo de Hugo Steiner. Benataj, geamikoj tiaj! Benataj de mi, kompreneble.

Plezure mi legos poste nian "Brazila Esperantisto". Ne forgesu riĉigi la Muzeon de Steiner. Li ĉion meritas. Mi estas sendanta al ĝi librojn kaj esperantajjn. Dankon pro viaj bonaj vortoj al mia laboro, mi nur serĉas esti utila, sciante ke mi plenumas devon. Amikajojn.

Frate via
Saldanha Carreira

N.B. Ĉio, kion vi sendos estonte al mi, leterojn, banderolojn, ktp. sen menciil esperantan originon. Malgraŭ la permeso, la fobio daŭras. Mi tute ne scias la motivon. La UK en 1968 okazos en Madrid kaj Franco akceptis esti Honora Prezidanto.

das, já refervem em enxames e enxames, já se estendem numa vasta nuvem agitada. Toldaram o céu, encheram o ar, vêm-nos ondeando sobre as cabeças. Agora, afinal, como os movimentos de uma grande vaga sombria, pontuada de branco, a librar-se entre a terra e a imensidade, baixa a massa inquieta, rumorejando, oscilando, flutuando, rasga-se na coroa das palmeiras, açoita os fios telegráficos, resvala pelos tetos do casario, e, ao cabo, arfando e remoinhando, turbilhonando e restrugindo com o estrepito de uma cascata argentina, de uma cachoeira de cristais que se despedaçam, chilreada imensa de vozes e grasnidos às dezenas de milhares, pendem, mergulham e desaparecem, numa imensa curva borbulhante, por sobre o largo telheiro abandonado, que essa aérea multidão erradia elegeu entre nós para abrigo do seu descanso nas cálidas noites de verão.

RADIO

Sorocaba, SP


Radio Clube de Sorocaba (1.080 kcs), Rua São Bento 190, 13.^{oa}., elsendas regule ĉiudimanĉe de la 21-a ĝis la 22-a h. la programon "Sintezo de Esperanto, Lingvo Internacia", kiu konsistas el ĝeneralaj informoj pri la Movado, kuriozaĵoj, poeziaĵoj, muziko, gramatikaĵoj, diktado el Método Elementar de Esperanto de Torres Pastorino.

B.E. volante sciigos siajn legantojn pri aliaj aktivecoj en radio.

NEKROLOGO

JORGE FIRMINO DE SANT'ANA

Nia fervora samideano Kapitano Jorge Firmino de Sant'Ana mortis en Juiz de Fora, Minas Gerais, la 21-an de Majo lasta. Li naskiĝis en Ouro Preto en la sama ŝtato la 25-an de Septembro 1888.



J. F. de Sant'Ana

En 1912 li komencis lerni tute sola la Internacian Lingvon. Li identiĝis kun la kreinto de Esperanto en liaj klopodoj vidi la Homaron unuigita per unu lingvo kaj eterne vivanta en paco. Li organizis grandan bibliotekon kun multaj Esperantaj verkoj. En diversaj lokoj li kreis Esperanto-kursojn kaj havis ĉiuspecajn lernantojn, de infanoj ĝis maljunuloj.

Li laboradis ĉe Clube Esperantista Juiz de Fora ekde ĝia fondo. Lia korespondado kun enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj estis notinda, kiel pruvas lia vastega arkivo de leteroj, kartoj, revuoj, libroj, memorigaĵoj, fotoj kaj poŝtmarkoj el la tuta mondo. Li ĉeestis la kongresojn de Esperanto en Niteroi, Belo Horizonte, Barbacena kaj Curitiba.

Dum multaj jaroj li estis Delegito kaj Fakdelegito pri Edukado. Li ĉiutage legadis la Sanktan Biblion speciale la Psalmojn I. Jam tiam malsana kaj ĝis siaj lastaj tagoj li alvokis siajn vizitantojn, ke ili lernu Esperanton.

MILITISTA TERMINARO

En unu grava kaj ofte forgesita fako de internaciaj rilatoj ankoraŭ mankas kompleta esperantista terminaro: Militistaj Aferoj. Tiu fako ne estas sensignifa al nia movado. Nuntempe ekzistas kaj certe ekzistos — eĉ multobliĝos — internaciaj armeoj kaj taĉmentoj konsistantaj el diverslandaj, do, diverslingvaj grupoj. La komando kaj administrado ĉiam okazadas en unu el la lingvoj de la grandaj potencoj. Tio ne nur estas lingva diskriminacio sed sence malebligas la elekton de la plej kvalifikitaj kaj kapablaj komandantoj kaj administrantoj ĉe ĉiuj tavoloj. Krom tio tre seriozaj eraroj povas okazi pro nekomprenejo de iaj nuancoj de la idiomo de la uzata nacia lingvo.

Bezona estas Esperantlingva Militista Terminaro kiu enhavos la bazan vortaron postulata por la komando

Sincere ni kondolencas la vidvinon kaj la gefilojn de nia karega samideano kaj kunlaboranto.

ANA AMÉLIA DE QUEIROZ CARNEIRO DE MENDONÇA

En Rio de Janeiro mortis la 31-an de Marto de la kuranta jaro S-ino Ana Amélia de Queirós Carneiro de Mendonça. Kiel dumviva prezidantino de Domo de la Studento ŝi apogis kaj favoris nian aferon. Ŝi estis dua vicprezidantino de la Organiza Komitato de la 10-a Brazilia Kongreso de Esperanto, kiu kunvenis en ĉi tiu urbo en 1945.

JOSÉ AUGUSTO BEZERRA DE MEDEIROS

Forpasis en Rio de Janeiro la 28-an de Majo lasta Prof. D-ro José Augusto Bezerra de Medeiros. Li estis ŝtatestro de Rio Grande do Norte, federacia deputito kaj senatano. Homo de granda kultruo, li estis sincera amiko de Esperanto. En 1925 li prezentis al la Cambro de la Deputitoj projekton de leĝo, laŭ kiu E. estos instruata en Kolegio Petro II en samaj kondiĉoj kiel germana kaj angla lingvoj.

RECENZO

Bertram Potts — NOKTO DA TIMO — Eld. Dana Esperanto-eldonejo, Abyhoj, Danlando, 1971 — 15 × 21 cm — 80 paĝoj — Prezo ĉe B.E.L.: Cr\$ 20,00.

Bertram Potts estas eminenta angla verkisto, kiu esperantistigis en 1912. Liaj verkoj estas, lingve kaj stile, unuarangaj. En tiu sama ŝtupo staras tiuj ĉi tri noveloj, nome "Nokto da Timo", "Ĉerizo-Torto" kaj "Poemo-Maŝino".

La unua priskribas perditan esploron en arкта regiono. Lia savo el la tempesto, en ĉasista kabano, estas pli terura, pli timiga, pli ĝena ol la senfina vagado. Ĉar tie li trovis obstinan — prefere oni diru dangan — ŝakludanton.

La dua novelo en la libro temas pri geedziĝo, kaj Amoro rolas en formo de ĉerizo-torto lerte bakita de ruza edzigebla vidvino. La esencan ĝuon spertas la leganto ĉe la fino, kie lin atendas surprizo. Ja surprizo estas la kerno de ĉiuj noveloj.

Fine la tria, la plej ĝuinda. S-ro Potts kreis fantazian atmosferon ĉirkaŭ la fama poetino, Marjorie Boulton. Kvankam proza, en sia tuto, tiu lasta

novelo enhavas kelkajn spritajn kaj bonkvalitajn poeziaĵojn. Bela specimeno sin trovas sur paĝoj 76/77: poemo "verkita" de "poemo-maŝino" estas prezentata en du vestoj, laŭ tio per kiu oni nutris la maŝinon. F-ino Boulton mem diris, ke ŝi opinias la verkon sprita kaj neordinara.

Pripensinte la aferon, ni bedaŭras, ke nia redakcio ne posedas "recenzo-maŝinon". Ho, ve!

Marjorie Boulton — NI AKTORAS — Eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhoj, Danlando — 15 × 21 cm — 36 paĝoj — Prezo ĉe la libroservo de B.E.L.: Cr\$ 4,00.

"La Participoj", "Fiŝkapti en malpura akvo" kaj "Spertulo pri la unua helpo" estas la titoloj de la skeĉoj verkitaj de Marjorie Boulton por la serio "Gajaj Klubvesperoj" de la Dana Esperanto-Eldonejo. Ilia ĉefa celo estas provizi lernantojn per amuza, simpla kaj malmultekosta materialo por ekzerco en klasoj (laŭtlegado) kaj klubkunvenoj (aktorado).

Plia vorto ne estas por diri nun riĉe al la libro, Kontraŭe tiu ĉi kroniko fariĝus pli granda ol ĝi.

Necesas nur provi ĝin sur scenejo aŭ malantaŭ pupitro. La aŭtorino plus la eldoninto kaj la recenzanto garantias feliĉan rezulton.

Joel Manso

kaj administrado de internacia armeo, kun aldonoj de nacilingvaj klarigoj tie, kie estas necese.

Urĝe bezonataj estas spertuloj — prefere profesiaj — pri ter-, mar- kaj aerarmeaj aferoj. Bonvenaj estas parolantoj de ĉiuj lingvoj sed nepre necesaj estas tiuj de la angla, rusa, germana, franca. Specialistoj pri ĉiuj branĉoj de la armeoj povas kaj devas kontribui, ne nur la tradiciaj kiel la infanterio, sanitara servo kaj cetere, sed ankaŭ la plej modernaj kiel atom — kaj rakettrupoj.

Mi petas ke volontuloj por kunlaborado en tiu ĉi grava projekto sin anoncu, kune kun konsiloj, sugestoj kaj ideoj pri labormetodoj kaj la organizado kaj disdivido de taskoj, al la subskribanto:

Majoro H. W. R. Petersen, Komisiito por Militista Terminaro, 180 Onepu Road, Lyall Bay, Wellington 3, Nov-Zelando.

CURSO DE ESPERANTO EXERCÍCIOS DE PRONÚNCIA

Disco e brochura

Prof. Geraldo Pádua

Face A — Material didático — BMLP — 1032 — Alfabeto, sílabas, palavras, comparação, acento tônico

Face B — Material didático. Grupos consonantais, divisão silábica, entonação, leitura.

Preço: Cr\$ 12,00.

Pedidos à B.E.L.